

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1992:1

Jen tute nova La Espero! Legu interne pri la sveda esperanto-kongreso, kiu okazos en Oskars-



hamn inter la 22-a kaj 24-a de majo. Legu ankaŭ pri la intensaj kontaktoj de SEF kaj la svedaj es-

perantistoj kun la esperantistoj de Tanzanio, kun kies landa organizo SEF ĝemeliĝis.

La Espero

Organ för
Svenska Esperantoförbundet

Redaktör: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Frågor om prenumeration o.dyl.:
Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

Ansvärlig utgivare: Leif Nordenstorm

Sättning: Leif Nordenstorm, Per Aarne Fritzson

Utformning: Omnibus, Tyresö

Tryck: BodoniTryck AB, Stockholm 1992

Prenumeration: 135 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 75 kr. Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

Esperantoförbundet

Adress: Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, tel. 08 -11 74 34

Öppettider: Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11-13 och 17.30-19.

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1992:

Direktansluten medlem 135 kr.
Famijmedlem (utan tidning) 60 kr.
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*. Om du inte får den, meddela ditt födelseår till EsperantoCentro.

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö

Besöksadress: Möllévångsgatan 20B, Malmö

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Telefontid: 1 september-15 maj: torsdagar kl. 17-18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Expedition: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala



SEF:s styrelse

Ordförande: Roland Lindblom, Stenbockens gata 102, 136 62 Handen, tel. 08-777 41 75

Vice ordförande: Kaisa Hansen, Hammarbyvägen 56, 194 36 Upplands Väsby, tel. 0760-882 10

Sekreterare: Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, tel. 08-712 82 91

Kassör: Börje Andersson, Ingegatan 4A, 541 50 Skövde, tel. 0500-122 05

Styrelseledamot: Kerstin Rohdin, Fack 142, 579 00 Högsby, tel. 0491-204 61

Styrelseledamot: Bertil Andreasson, Södra Rörum Pl. 455, 242 94 Hörby, tel. 0415-501 52

Styrelseledamot: Haldo Vedin, Jordbrogatan 57, 603 64 Norrköping, tel. 011-17 36 87

Suppleant: Per Aarne Fritzson, Västertorpsvägen 154, 126 59 Hägersten, tel. 08-97 47 76

Suppleant: Leif Nordenstorm, Munkebergsgatan 38, 3 tr., 951 56 Luleå, tel. 0920-279 78

Styrelsen åker ut

ur *La Espero*. I varje fall kommer adresserna till hela styrelsen i fortsättningen inte att publiceras i varje nummer, utan kanske två gånger om året. Skriv av, fotokopiera eller spara denna sida till nästa gång!

För liten medlemsavgift

har influerit från vissa medlemmar, som inte uppmärksammat höjningen till 135 kr för direktansluten SEF-medlem. Kasören drar sig ingalunda för besväret att bokföra inbetalningar på felande tior till pg-konto 20 12-3...

Anmäl dig till

kongressen i Wien 25 juli-1 aug 1992.

Kongressavgiften i svenska kronor:

Kategori	från 920101	från 920401
Direktmedlem i UEA (ej MG)	745	890
Ej direkt medlem i UEA	890	1035
Medföljande, handikappad eller ungdom (under 30 år 1992-01-01), direktmedlem i UEA	450	600
Medföljande, handikappad eller ungdom, som inte är direkt medlem i UEA	600	745

Beställ anmälningsblanketter hos: Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl 455, 242 94 Hörby, tel: 0415/501 52. Blanketten skall sedan skickas tillbaka till samma adress.

All betalning sker till: pg 14 74 29 - 5, Esperantoförbundets specialkonto, Hörby. Ange på talongen vad som avses.

Oskarshamn kongresurbo

22 — 24 majo 1992

En 1991 Sveda Esperanto-Federacio kongresis en Gotenburgo, tiu granda havenurbo, kiu frontas okcidenten al la Norda Maro kaj al la iama nova mondo, Usono. En 1992 SEF kongresos ĉe la alia flanko de Svedio, en Oskarshamn, havenurbo frontanta eĉ pli novan mondon de evoluigantaj landoj trans la Balta Maro.

Oskarshamn ricevis siajn urbajn privilegiojn kaj sian nomon de la reĝo Oskar la 1-a en 1856. Antaŭ tio ĝi estis la vilaĝo Döderhultsvik, konata de la mezepoko pro sia bonega haveno. Dum longa tempo la regionon dominis la ŝipkonstrua kaj ŝip-repara industrioj. Nun, kvankam Oskarshamn ankoraŭ rolas kiel haveno, ĝia industria agado estas pli varia. Hodiaŭ Oskarshamn estas moderna industria kaj komerca urbo, unu el la plej gravaj havenoj ĉe la orienta marbordo.

De Oskarshamn oni povas ekskursi al la insuloj Öland kaj Gotland kaj al la insuleto Blå Jungfrun ("la blua virgulino"), kiu en 1925 estis deklarita nacia parko. Ĝi estas geologie tre interesa kaj elstare riĉa koncerne plantojn, florojn kaj birdojn. Ligita al Blå Jungfrun estas la nomoj de kelkaj famaj svedoj: Linné, Heidenstam, Fröding kaj Engström.

Kiel multaj svedaj urboj, Oskarshamn retenas kernon de sia historio en malnova kvartalo de bone konservitaj domoj. En Oskarshamn tiuj estas ĉefe de iamaj fiŝkaptistoj kaj datiĝas de la deksepa kaj dekoka jarcentoj.

Unikaĵo estas "Den Långa Sofan" (la longa sofo), reklamata kiel la plej longa ligna benko en la mondo. La 72 metrojn longa benko staras ĉe la haveno, kie la virinoj de la urbo iam atendadis revenontajn fiŝkaptistojn kaj maristojn.

Alia unikaĵo, kiun aparte prifleras Oskarshamn, estas la lignaj figuroj de Axel Pettersson, la skulptisto de Döderhult. Pettersson registris la ĉiutagajn vivojn de kamparanoj, pastroj, soldatoj, farmlaboruloj, bovinoj, ĉevaloj ks. per formado de lignaj skulptaĵoj altaj je dudek-tridek centimetroj. Tiuj figuroj posedas eksterordinaran energion, viklecon kaj esprimoplenon. Post jaroj de neglekto, tiuj fi-

guroj nun trovas siajn ĝustajn lokojn en muzeoj tra la mondo, sed la ĉefkolekto prezentiĝas en la vizitenda Döderhult-muzeo en Oskarshamn.

Kelkajn kilometrojn norde de la urbo situas la vilaĝo de Stensjö. Tiu vilaĝo estas konservita preskaŭ senŝanĝe dum du jarcentoj kiel specimeno de vilaĝo el la 17-a jarcento, tipa por tiu ĉi regiono. La vilaĝo vivas kiel funkcia farmbieno. La plejparto de la laboro estas daŭre farata per malnovaj kultivmetodoj.

En la valo de Döderhult staras la sinjora domo de Fredriksberg, plejparte konstruita en la 18-a jarcento. La domo ankoraŭ havas siajn originalajn meblojn kaj tapetojn, kaj viziti ĝin estas viziti la hejmon de riĉa, burĝa familio de la 18-a jarcento.

Por nia 20-jarcenta kongreso ni tamen planas pli aktualan programon. La temo de la kongreso estos "Esperanto kiel kultura perilo". Kaj ni esperas instigi al debato pri la koncepto "kulturo" ĝene-

KONGRESAJ KOTIZOJ KAJ PREZOJ

Kongreskotizoj	Prezo	Kodo
Pago ĝis la 20-a de marto	200:–	A
Pago post la 20-a de marto	225:–	B
SEJU-membroj ĝis la 20-a de marto	100:–	C
SEJU-membro post la 20-a de marto	125:–	Ĉ
<i>Kongresa pakajo – manĝo kaj ĉambro en la popolaltlernejo</i>		
Unulita ĉambro	950:–	D
Dulita ĉambro/persono	835:–	E
<i>Apartaj prezoj</i>		
Unulita ĉambro/nokto	250:–	F
Dulita ĉambro/nokto/persono	200:–	G
Manĝo dum la tuta kongreso	475:–	Ĝ
<i>Kunportu littukojn kaj viŝtukojn!</i>		
<i>Indiku se vi volas vegetaran manĝon!</i>		
Surplanka dormado en propra dormsako/nokto	30:–	H
Ekzistas junulargastejo. Vi devas mem mendi lokon tie. Adreso: Åsavägen 8, tel: 0491/881 98		
Ekskurso al Döderhult-muzeo	senkosta	
<i>Kongresaj glumarkoj (inkl. sendkostoj)</i>		
8 markoj	15:–	Ĥ
16 markoj	20:–	I
32 markoj	35:–	J

Pagu al pĝ 481 43 95 - 2, SEF-jarkongreso, c/o Tore Johansson
Indiku la kodojn de la pagataj eroj.

Adreso de la kasisto:

Tore Johansson, Silkesborgsgatan 7 C, 392 43 Kalmar, tel: 0480/145 37.

Programo

por la jarkongreso de la Sveda Esperanto-Federacio
en Oskarshamn inter la 22-a kaj 24-a de majo 1992

Vendrede la 22-an de majo

- 16.00 La akceptejo ekdeĵoras
16.00-18.30 Kontinua videoprezentado de elĉerpaĵoj de esperanto-kulturfestivaloj, teatro-
prezentadoj kaj kantoj. Lumbilda prezentado pri Oskarshamn kaj la regiono.
18.30- Interkona vespero
Vespermanĝo
Kafoje Oskarshamn (kantoj, intervjuoj, muzikeroj, prezentadoj)

Sabate la 23-an de majo

- 07.30-08.30 Matenmanĝo
08.30-10.00 Jarkunveno de la sveda sekcio de ILEI
09.30-10.30 Jarkunveno de SEJU
10.15-10.30 Kafo aŭ teo
10.30 Jarkunveno de Eldona Societo Esperanto
12.00 Solena malfermo de la kongreso kun invititaj gastoj
13.00 Lunĉo
14.00 Jarkunveno de SEF
16.00-16.15 Kafo aŭ teo
16.15-17.15 "Esperanto - ĉu mondlingvo aŭ peranto de kulturaj valoroj?" Prelego de d-ro
Erich-Dieter Krause, membro de la Akademio de Esperanto, prezidanto de la
Saksa Esperanto-Asocio, kompilanto de la Germana Esperanto-Vortaro, leksi-
kologo pri esperanto.
17.15 Jarkunveno de Sveda Esperanto-Instituto (elektitaj reprezentantoj)
18.15-19.00 "Vagabondo" teatraĵo verkita de Harold Brown, surscenigita de Jerzy Fornal.
Fornal, dum multaj jaroj aktoro ĉe la pola nacia teatro, nun dediĉas sin tute al
prezentado de teatraĵoj en esperanto. Li prezentas regule ĉe propra esperan-
to-teatro en Varsovio kaj turneas mondscale kun sia esperanto-repertuaro.
20.00 Supeo
21.00 Kafo kun komunaj popoldancoj (trankvilaj)
Eventualaj prezentoj kaj kantoj

Dimanĉe la 24-an de majo

- 07.30-08.30 Matenmanĝo
08.15-09.00 Diservo en Cecilia kapelo en aranĝo de la sveda sekcio de KELI
09.15-10.15 "La leksikologio de Esperanto" Prelego de d-ro Erich-Dieter Krause
10.30-11.00 Kafo aŭ teo
11.00-12.00 Aŭkcio
12.15 Fermo de la kongreso
13.00-14.00 Lunĉo
14.15 Vizito al la Döderhults-muzeo

rale, ĉar kulturo kompreneble ampleksas multe pli ol nur la belartojn. Ni starigos ekspoziciojn de verkoj de tri artistoj el Britio, Estonio kaj Siberio, kaj prezentos teatraĵojn originale verkita en esperanto. Oskarshamn estas ĝemelurbo al Pärnu en Estonio. Ni bonvenigos inter niaj eksterlandaj gastoj grupon el tiu lando, kun kiu ni en tiu ĉi regiono kunlaboris dum 1991.

Ni invitas kongresanojn el ĉiuj najbaraj landoj kaj kompreneble el la tuta mondo!

La kongresejo estos la altlernejo de Oskarshamn, kiu situas meze en la urbo kaj superrigardas la urbon kaj la maron.

Bonvenon al Oskarshamn en majo 1992!

LKK de la Oskarshamna kongreso

SEF KONGRESO de Esperanto



22-24
majo
1992



Oskarshamn

Skicka inte brev utan
kongressmärken!

Beställ genom
pg-konto 481 43 95-2
SEF-jarkongreso
c/o Tore Johansson

Pris inkl. porto:

8 st	15 kr
16 st	20 kr
32 st	35 kr

ALVOKO

La vigla afrika movado suferas je manko de mono kaj instruistoj. Troviĝas pluraj eblecoj faciligi la laboron de niaj junaj samideanoj.

- 1 SEF ĝemeliĝis kun Tanzania Esperanto-Asocio. Via klubo povas ĝemeliĝi kun tanzania klubo. Turnu vin al Anita Dagmarsdotter por pliaj informoj.
- 2 Donacu al Fonduso Afriko de UEA. Kiu ajn sumo estas bonvena kaj plej facile vi pagas al la sveda poŝtĝira konto de UEA: 7 43 74-0.
- 3 Korespondu kun unu aŭ pluraj afrikanoj kun lingva gvidado. Adresojn de tanzanianoj peras Anita Dagmarsdotter.
- 4 Kontribuu al fonduso por vojaĝstipendioj al tanzanianoj. Tio estas propono de la partoprenintoj de la Dua Afrika Kongreso. Amy Nilsson kaj Anita Dagmarsdotter, kiuj ambaŭ pagis jam po 100 kronojn tiucele.

Adreso: Anita Dagmarsdotter, Mariehamngatan 18, 164 79 KISTA.

Mia vojaĝo al Eŭropo

La vizito en Eŭropo estis ebla pro stipendio de Unesko, kontribuadoj de Universala Esperanto-Asocio, Sveda Esperanto-Federacio, Anita Dagmarsdotter, Ulla Luin, Kurt kaj Hilgon Frisk kaj ankoraŭ multaj, ĉefe svedaj, amikoj. Mi esprimas mian koran dankon al ĉiuj.

La vojaĝo komenciĝis la 9-an de julio je la 8-a horo matene. Mi atingis Stokholmon vespere la saman tagon. Ĉe la flughaveno mi renkontiĝis kun Anita Dagmarsdotter, kiu zorgas pri tanzaniaj esperantistoj. Ŝi venis tien por akcepti min. Kun granda ĝojo ni tuj veturis al ŝia hejmo, kie mi loĝis dum la tuta restado en Stokholmo.

Mi estis en Stokholmo dek tagojn. Dum tiuj tagoj mi kun Anita vizitis kelkajn vidindaĵojn en Stokholmo.

Mi vizitis Upsalon, kie loĝas mia instruisto Jan Setréus. Ni tradukis kelkajn ĉapitrojn el lia libro *Ne krokodilu!* en la svahilan lingvon. Dum tiu tempo ni ankaŭ diskutis vortojn en la svahila, malfacile tradukeblajn en esperanton.

Mi revenis en Stokholmon la 18-an de julio kaj renkontis britajn junajn esperantistojn. Estis prezidanto de Brita Junulara Esperanto-Asocio kaj lia amiko. Ni interŝanĝis ideojn, kaj ili klarigis al mi, kiel la organizo funkcias. Mi petis pri ĝemeliĝo kun nia juna asocio en Tanzanio kaj ili interesiĝis pri tiu afero. Ili promesis plutrakti ĝin kiam ili revenos al sia lando.

IJK en Karlskoga

La 20-an de julio, kune kun la du britoj, mi vojaĝis al Karlskoga. Tie okazis la 47-a Internacia Junulara Kongreso (IJK). Survoje al Karlskoga ni renkontis multajn junajn esperantistojn el diversaj landoj, kiuj ankaŭ partoprenos la kongreson. La etoso tuj ŝanĝiĝis kaj mi sentis,

ke mi estas en Esperantujo.

Entute 183 homoj el 35 landoj partoprenis la kongreson. Mi pensas, ke ĝi estis tre bona.

Karlskoga estas konata urbo en nordiaj landoj, ne nur pro ĝia beleco sed ankaŭ pro la bela naturo kaj la historio de la konata Alfred Nobel.

La kongreso malfermiĝis la 20-an de julio per interesa interkona vespero. Ĉiuj ĉeestintoj de la interkona vespero diras: "Mi ne forgesos tiun amuzan vesperon."

La IJK-semajno estis feliĉa kaj oni interŝanĝis ideojn. Amuzaĵo por la junularo estis muziko. Venis du muzikbandoj nomataj Persone kaj Amplifiki, kiuj ludas internacian muzikon. Du sovetianoj, Ŝo-mart kaj Nataŝa, kantis belajn kantojn.

UK en Bergen

La 27-an de julio ni vojaĝis al Bergeno en Norvegio por partopreni la 76-an Universalan Kongreson.

En la trajno al Oslo mi faris malgrandan esploron: Mi promenis tra la vagonaro – en la tuta trajno sidis en la koridoroj esperantistoj kaj interparolis. Ni interkonatiĝis kaj estis ĉiuj de diversaj landoj. Ni interparolis dum la tuta nokta vojaĝo.

Ni atingis Oslon en la mateno kaj atendante la trajnon al Bergeno ni restis tie la tutan tagon kaj promenis en la stratoj. Mirinde – ĉie en la stratoj ni renkontis esperantistojn, parolis kaj interkonatiĝis.

La kongreso okazis en Bergeno kun 2.295 partoprenantoj el 55 landoj. La kongreso estis bela kaj interesa. Estis multe da programeroj, do estis iomete malfacile elekti, kion ĉeesti. Sed ofte mi partoprenis Ĉeh-seminariojn, kursojn, kunvenojn pri agado en Afriko. Mi preci-

pe interesiĝis pri la diskutado pri afrika agado. Tiuj kunvenoj okazis en la dimanĉo, ĵaŭdo kaj vendredo. Dum la diskutoj oni detale traktis multajn demandojn – kiel helpi afrikanojn ktp. Dum la diskutoj mi sentis same, kiel filo sidanta kun siaj gepatroj parolante pri lia edziĝofesto. Vi povas imagi, kian feliĉon mi sentis tiam.

Dum la tuta semajno la UEA-respondeculo pri Afriko, Hans Bakker, ĉiutage sidis ĉe ĝiĉeto markita "Amiko de Afriko". Oni vizitis la ĝiĉeton, Bakker klarigis pri la agado en Afriko kaj li havis multajn adresojn de afrikaj esperantistoj.

Post la kongreso mi veturis al Skövde en Svedio, kie loĝas mia korespondamiko Kurt Frisk. Mi restis tie dum du tagoj kaj li montris al mi la urbon. En proksima lago ni naĝis kune kun aliaj esperantistoj.

Intensaj studoj en Stokholmo

Sveda Esperanto-Federacio aranĝis por mi kurson en Stokholmo kaj trovis ses esperantistojn por instrui min.

Bertil Wennergren instruis al mi pri gramatiko kaj kiel skribi bonan esperanton. Li ankaŭ instruis al mi kelkajn manierojn por instrui al komencanto.

Ingvar Schoultz instruis al mi metodon, per kiu komencanto povas pli rapide lerni paroli esperanton. Krome li korektis ĉiujn erarojn, kiujn mi faris parolante kun li.

Erik Bohlin instruis al mi pri lingvaŭskultado kaj lingvo-kompreno.

Ole Hansen instruis al mi pri la esperanta literaturo kaj montris al mi librojn de gravaj verkistoj.

Oksana Kurpekova kaj Vladimir Soroka montris al mi, kiel instrui per muziko.


Esperantistoj en Stokholmo estas ĉarmaj, mi diras tion, ĉar dum mia restado tie ili invitis min al kelkaj renkontiĝoj. Ekzemple ili iun tagon invitis min al sia kunveno en kafejo. Ili ankaŭ invitis min al la junulara Barnens Ö-renkontiĝo ekster la urbo. Tie ni renkontiĝis - junaj esperantistoj el ok landoj: Svedio, Ukraino, Litovio, Rusio, Germanio, Francio, Britio kaj Tanzanio. La renkontiĝo estas

Dum la aŭtuno 1991 intensiĝis la kontaktoj inter la svedaj kaj afrikaj esperantistoj, precipe kun la esperantistoj de Tanzanio, kun kiuj SEF, la kluboj de Stokholmo kaj de Upplands Väsby havas "ĝemelrilatojn". Sur la sekvantaj paĝoj venas kelkaj raportoj pri tiuj rilatoj.

aranĝita ĉiujare kaj la celo estas agrabla, internacia kunestado kaj esperanto-temaj studrondetoj.

La 21-a de aŭgusto estis amuza vespero. Tiam ni sidis ĉe manĝotablo kun tri flagoj antaŭ ni - flagoj de Svedio, Es-

Vizito al ĝemela klubo en Tanzanio



Gajaj momentoj kun tanzaniaj amikoj. Multaj legantoj rekonos sur la bildoj la vizaĝon de Costantine S. Mashauri.

(Fotis Agneta Emanuelsson)

peranto kaj Tanzanio. Tiam okazis ĝemeliĝo inter la esperanto-klubo de Dar-es-Salaam kaj Upplands Väsby.

Fine la prezidanto de SEF, s-ro Roland Lindblom, renkontis min ĉe Esperanto-Centro. Nome de la membroj de SEF li transdonis salutojn al tanzaniaj esperantistoj. Mi parolis kun li pri ĝemeliĝo inter nia juna asocio en Tanzanio kaj SEF. Li estis favora al tiu ideo kaj promesis ĝin kun la estraro de SEF. Mi esperas, ke ni ricevos respondon post nelonga tempo.

La 26-an de aŭgusto mi ekveturis aviadile al Dar-es-Salaam. Kiam mi eniris la aviadilon, mi unue staris dum minuto sur la ŝtuparo por adiaŭi la urbon Stokholmo, ĉar mi ne scias, ĉu mi iam revenos aŭ ne. Tion ni vidos.

Costantine S. Mashauri
Dar-es-Salaam

En aŭgusto 1991 nia klubo en Upplands Väsby ĝemeliĝis kun la klubo en Dar-es-Salaam (mallonge: Dar) en Tanzanio. Ĝemeliĝo estas interkonsento kunlabori, sed kiel? Mi decidis fari vojaĝon al Dar-es-Salaam por renkontiĝi kun la membroj de la klubo tie. Mi skribis al Costantine Mashauri, la prezidanto de DEK (Dar-es-Salaam Esperanto-Klubo) kaj al Israel C. Kumbo, la prezidanto de Tanzania Esperanto-Asocio (TEA), por informi, ke meze de novembro mi alvenos al Dar kune kun Agneta Emanuelsson, Katrineholm, kaj Inger Lannergård, Krylbo.

Ankaŭ SEF ĝemeliĝis kun TEA, kaj nia vojaĝo fariĝis pli oficiala ol libertempa. Nur kelkajn horojn post nia surteriĝo en Afriko okazis la unua renkontiĝo kun la membroj de DEK. Kolektiĝis ĉ. dek kvin junaj kaj entuziasmaj viroj kaj virinoj.

Ni pasigis kvar tagojn en Dar. Costantine kaj aliaj esperantistoj akompanis nin ĉie kaj montris al ni sian urbon. La 23-

an de novembro ni forlasis Dar por viziti aliajn klubojn en la lando. Entute ekzistas en Tanzanio 11 kluboj kaj ni sukcesis viziti ses el ili. La plej grandaj kluboj estas DEK kun 40 membroj kaj Bunda kun 20 membroj.

Dum nia vojaĝo tra la lando de Dar al Mwanza, Bunda, Arusha, Tanga kaj Pangani nin akompanis Kumbo kaj esperantistoj surlokaĵ. Tri blankulinoj promenantaj kun tanzanianoj estas ege videblaj kaj ni kompreneble ĉie alvokis intereson de aliaj homoj. Oni demandis nin, de kie ni venas, kiuj ni estas, kion ni faras en Tanzanio. Ni rakontis pri esperanto, pri Svedio, pri nia kunlaboro kun tanzaniaj esperantistoj. La lokaj klubanoj tuj bonvenigis homojn lerni esperanton. Nia vojaĝo vere fariĝis verda!

Reveninte al Dar post du-semajna vojaĝo, ni kunvenis ankoraŭ foje kun DEK. Mi intervjuis ĉiujn membrojn kaj fotis ilin por montri al miaj samklubanoj hejme. Ni interkonsentis memori tiun tagon, la 8-an de decembro, kaj nomi ĝin nia komuna "Dar-es-Salaam—Upplands Väsby-tago" kaj estonte ĉiam samtempe kunveni en tiu tago en niaj respektivaj landoj. Ni komencos interkorespondi. Ŝajnas al mi, ke ni havas la necesan bazon por evolui niajn kontaktojn kaj interŝanĝon de ideoj en diversaj agadoj. Ekzemple, la ĉefinstruisto en la klubo Kumbo koresponde instruas ne nur membrojn de DEK sed ankaŭ aliajn dise en Tanzanio. Tiel la aliaj kluboj ricevas apogon de pli spertaj esperantistoj.

Ni esperas, ke ankaŭ ni donis apogon al la juna tanzania esperanto-movado pere de nia vizito, montrante al tanzaniaj ĝenerale, ke esperanto estas vivanta lingvo, kiun uzas homoj en la tuta mondo.

Ni kore dankas al ĉiuj tanzaniaj esperantistoj pro ilia varma akcepto, kaj precipe al Israel C. Kumbo kaj Costantine Mashauri, kiuj dediĉis sian tutan tempon kaj atenton al ni dum nia vizito, el kiu espereble rezultos pli da esperantistoj en Tanzanio. Ni certe havas pli da amikoj!

Anita Bergh

Dua Afrika Kongreso de Esperanto

La okazigo de la Unua kaj nun la Dua Afrika Kongreso (en Cotonou, 28–31 decembro 1991) montras, ke la kreskanta movado sur tiu vasta kontinento havas vivoforton kaj ke la junaj samideanoj fervore serĉas eblecojn utiligi esperanton por interŝanĝo de ideoj.

Partoprenis en DAK preskaŭ okdek afrikanoj el Niĝerio, Togolando, Ganao, Ebura Bordo kaj, kompreneble, Benino mem. Usonano, laboranta en Benino, belgoj el Gabono kaj aro da partoprenantoj el Finnlando, Svedio, Norvegio, Britio, Nederlando, Germanio, Francio kaj Italio igis ĝin eĉ pli internacia.

La ĉeftemo dum la kvar kongrestagoj estis turismo. Kvar prelegoj traktis la temon kaj esperanto en Afriko.

La unuan vesperon profesia grupo

amuzis nin per beninaj kaj niĝeriaj dancoj kaj akrobataĵoj. Postan vesperon samideanoj el Togolando kaj Ebura Bordo prezentis siajn landojn kaj kelkajn simplajn skeĉojn kaj kantojn. Ganaanoj alvenis fine de la vespero kaj la nura apero kaŭzis aplaŭdojn.

Preparu vin por la Tria Afrika Kongreso de Esperanto, kiu okazos en 1993 en Accra, Ganao!

Postkongreso en Benino

Dum kvin tagoj ni restis en Benino kaj havis la eblecon konatiĝi kun du junaj senegalanoj. Ili veturis dum sep tagoj, sed alvenis nur post la kongreso pro misinformo pri la vojaĝo. La lastan tagon de 1991 ni spertis la ondegojn de la Atlantiko kaj la jarŝanĝon surstrate en Coto-

nou. Dum la posttagmezo la forta trafiko, ĉefe motorcikloj kun pasaĝero, mirigis nin eksterlandanojn. La klarigo estis, ke la unua tago de la jaro estas tre grava kaj ĉiuj volas festi ĝin trankvile kun sia familio. Pro tio oni urĝas por prepari la feston.

Vagante tra centraj kvartaloj ni renkontis la novan jaron en varma, polva kaj mirinde trankvila Cotonou. Ni vizitis kelkajn turismajn lokojn kaj spertis diversajn lokajn restoraciojn.

Postkongreso en Ebura Bordo

Alproksimiĝante al Abidjano, la aviadilo subite turniĝis norden kaj la kapitano informis, ke sabloŝtormo malebligis surterigon. Kun iom da ekscito ni atendis en la flughaveno de Ouagadougou, Burkina Faso. Ĉu ni devus tranokti (la plejmulto ŝatus tion)? Sed ne, post kelkaj horoj ni reiris suden. Niaj amikoj de Abidjano atendis en la flughaveno sen ebleco informi la amikojn atendantajn en la hotelo.

La restado en Ebura Bordo daŭris naŭ tagojn kaj estis bone organizita. I.a. ni vizitis la politikan ĉefurbon Yamoussoukro, meze de la lando, la naskiĝurbo de la prezidento. "Donace" al la popolo la prezidento konstruigis teknikan altlernejon kaj grandegan basilikon en la urbeto. La impreso estas, ke tio estas vera insigno de stulteco kaj malavaro. La luksa altlernejo similas al Saudarabia hotelo, ĝi povas akcepti 1 500 studentojn, sed pro financaj kialoj, manko de stipendioj, nur 800 studentoj studas tie. La basiliko havas 22 pordegojn, kiuj ĉiuj povas esti malfermitaj por deservo kun miloj da homoj sur la grandega placo - de kie ili venas? Klimatiziloj ĉe ĉiu pordego kaj ĉe preskaŭ ĉiu sidloko en la basiliko ebligas agrablan klimaton ene, spite al 35-40 gradoj ekstere. Je kiu kosto?

Mi mem tre ĝuis la vojaĝon, mi ja antaŭe spertis la varmon, la polvon, la prokrastojn, la malpuron de afrika grandurbo. Kaj mi ege ĝojis renkonti ses de miaj afrikaj "filoj", kiuj vizitis Eŭropon por la jubilea UK en 1987.

Landa organizo en Tanzanio

Dum la lastaj jaroj tanzaniaj esperantistoj laboris por starigi kaj registri landan asocion. Antaŭ iom pli ol unu jaro la lasta peto pri registrado estis prezentita al la aŭtoritatoj de Dar-es-Salaam. Oni longe atendis la finan subskribon de la dokumento, sed lastatempe la afero turniĝis. La aŭtoritatoj trovis registrigon de Tanganyika Esperanto-Asocio jam en 1964! Tiutempe, tute evidente, la movado ne estis preta por tiu paŝo. Oni neniam havigis la dokumentojn de la aŭtoritato.

La malnova, neekzistanta, organizo nun fandiĝis kun la nova, tiel ke la provizora estraro de Tanzania Esperanto-Asocio okazigos renkontiĝon en julio, laŭ la statutoj de Tanganyika Esperanto-Asocio. Dum la renkontiĝo oni traktos nomŝanĝon, ŝanĝon de statuto kaj elekton de estraro.

Costatine S Mashauri, kiu vizitis Sve-

dion pasintsomere, kaj Israel C Kumbo, prezidanto, estas la motoroj de TAE.

Niaj tanzaniaj amikoj esperas, ke svedoj partoprenos tiun gravan unuan renkontiĝon, kiu verŝajne okazos en Dar-es-Salaam.

Dar-es-Salaam estas la ekonomia ĉefurbo de Tanzanio. Ĝi situas ĉe la Hinda Oceano kaj ĝuste dum julio estas la plej agrabla klimato por ni eŭropanoj. Por vojaĝema esperantisto estas tre bona okazo por viziti landon, ankoraŭ ne tre ŝanĝitan pro turistoj.

Al tiu, kiu volas viziti aliajn partojn de la lando, la tanzaniaj amikoj kun ĝojo ofertas kunvojaĝon kun esperantisto, kontraŭ kosto malaltaj laŭ nia valuto. Tian sperton havas jam la tri svedaj esperantistinoj, kiuj vizitis Tanzanion en novembro/decembro pasintjare.

Anita Dagmarsdotter

Anita Dagmarsdotter

Osvald Nicolaisen

"De biciklo al rulapogilo" eble oni povus diri pri Osvald Nicolaisen, maljuna sinjoro kun juna kapo kaj verda koro.

Dum sia juneco Osvald translandlime bicikladis, ekzemple de Norvegio al Francio. Nun, fariĝinte 85-jarulo, li bezonas tri-radan help-aparaton por povi piediri – verŝajne oni nomu ĝin "rulapogilo".

Sed por komenci komence. Kiu estas Osvald Nicolaisen? Kial skribi pri li ĉi tie?

Kiel la inteligenta leganto jam divenis, temas pri tio, ke Osvald dum sia vivo aktivis por esperanto. Tre aktivis, fakte.

Krome la osvalda vivo estas ege interesa, parte eĉ drameca. Li iel estas "viva histori-libro".

Nordulo

Osvald naskiĝis en Hammerfesto – la plej norda urbo de la mondo, kiu troviĝas en Norvegio. Tio okazis en la jaro 1906.

Kiam kaj kiamaniere Osvald ekverdiĝis, fariĝis esperantisto?

Unue li eksciis pri esperanto en 1930, per artikolo en la semajna ĵurnalo *Arbejderbladet*. Kiam li la postan jaron vizitis sian fratinton en Kiruna, tie estis juna esperanto-instruisto el Estonio, kiu gividis kursojn en la urbo.

Osvald partoprenis, unue 2-monatan kaj poste daŭrigan kurson. Reveninte al Norvegio, li legis librojn. Somere li vojaĝis al Nederlando kaj trairis kurson pri la Cseh-metodo.

Kiam li nun mem sciis instrui esperanton, dudek hammerfestanoj fariĝis liaj unuaj viktimoj. Poste, pere de la sindikato en Tromsø, li tie trovis ankoraŭ pli ol cent.

Sed lia apetito verŝajne nur kreskis, ĉar baldaŭ Osvald faris vojaĝon laŭlonge de la tuta norvega marbordo, de Kirkenäs ĝis Kristiansand. Rezulto: Ankoraŭ 2.000 trakursigitoj.

Biciklinto

Sian unuan UEA-kongreson Osvald partoprenis en 1937, en Varsovio.

– Mi biciklis tien. Mi biciklis de norda Norvegio. De Kiruna al Stokholmo kaj de tie per ŝipo al Finnlando. Poste Estonio, Latvio, Litovio... al la kongreso.



Kiom da tempo vi bezonis?

– La tutan someron. Kaj post la kongreso mi biciklis tra Pollando ĝis Aŭstrio.

Sed ĉi tio estis nur la dua longdistanca biciklado de Osvald:

– La unua estis de norda Norvegio al Oslo; poste tra Danlando, Germanio ĝis Parizo.

Survoje li instruis esperanton.

Malheliĝintaj nuboj

En 1938 Osvald estis en Ĉeĥoslovakio, ĉar li estis tie dungita kiel esperanto-instruisto. Tiam estis malheliĝintaj la nuboj super nia kontinento, kaj dum la vizito de Osvald la germanoj invadis la landon. Kaj Germanio kaj Pollando okupis ĉeĥoslovakajn teritoriojn.

Osvald devis subite fuĝi, ne senprobleme:

– La ĉeĥoj timis bombardon de Praha, pro tio ne estis lumo dum la nokto kaj mi forgesis multajn aĵojn en mia ĉambro. Ĉiuj pontoj kaj vojoj al Germanio estis detruitaj, tial mi devis reveni tra Pollando. Trans la landlimo eblis iri nur piede.

Alveninte al Danzig/Gdansk li loĝis en junulara gastejo, sed entiriĝis en politikan diskutadon:

– Oni parolis pri Hitler, ke li estis la plej bona homo de la mondo kaj tiel plu. Tiam mi kontraŭdiris, kaj oni preskaŭ

kuris al mi por bati. Do, mi silentis.

La intenco de Osvald estis matene la postan tagon iri per ŝipo al Oslo. Sed tiam la ŝipo estis jam for.

Kion fari? Nun Osvald celis iri per trajno al Berlino, sed por tion fari li devus trapasi pollandan teritorion ankoraŭfoje, kaj por tio li ne havis vizon. Do, ĉe la pola landlimo li estis arestita:

– Mi petis ilin tuj kontakti la norvegan ambasadon en Varsovio. Post tio mi ricevis permeson daŭrigi al Marienburg.

En Orienta Prusio?

– Jes, kaj de tie mi devis denove veturi tra Pollando, sed tiam enŝlosita en vagono kun plumbosigelitaj pordoj kaj fenestroj.

Denova invado

Kiam la germanoj du jarojn poste, la 9-an de aprilo 1940, invadis lian propran landon, Osvald tuj aliĝis al la milita rezisto.

Jam antaŭ la milito li fariĝis oficiro en la norvega armeo. Evidente la plej granda tago de lia vivo – pri sia oficireco norvega Osvald tre fieras. Nur rakonti pri lia partopreno en la bataloj kontraŭ la germanoj sufiĉus por aparta artikolo, pro spacaj konsideroj ni devas nun plui al la postmilita tempo.

Konstateblas nur, ke Hammerfest apartenas al la urboj, kiuj estis tute for-

bruligitaj de la invadintaj faŝistoj. Versaj-ne la malĝojo pro la detruo de ŝia domo kontribuis al la tiutempa morto de la patrino de Osvald.

Ĉi tie ni havas ankaŭ la klarigon, kial Osvald Nicolaisen translokiĝis al Svedio. Dum 50 jaroj de sia vivo li loĝis kaj laboris ĉe ni, plejparte kiel kontoristo.

UEA-laboro

Post la milito estis ja denove organizitaj internaciaj esperanto-kongresoj. UEA havis kongreson en Berno en 1947. Osvald ne nur partoprenis, li organizis la kongreson. Li estis la KKS – Konstanta Kongresa Sekretario – de UEA tiutempe.

Ankaŭ malantaŭ la kongresoj en Malmö 1948, Bournemouth 1949 kaj Parizo 1950 estis Osvald kiu tiris la fadenojn.

Do por kvar grandaj UEA-aranĝoj li respondecis. Tio signifis, ke li dum longa

tempo devis esti vojaĝanta, loĝi en hotelaj ĉambroj.

Vojaĝemulo

Jam de la ĝis nun menciita evidentiĝas ke Osvald multe vojaĝis. Malgraŭ tio, la plej intensa vojaĝado liaflanke okazis nur post tio, ke li emeritiĝis. Entute Osvald Nicolaisen dum sia vivo vizitis 115 landojn! Ne ĉiujn bicikle, tamen...

Fina demando:

Kiu lando al vi plej plaĉis?

– Estas Svedio. Post Norvegio, kompreneble!

Aliaj de Osvald ŝatataj landoj estas Italio kaj Brazilo.

– Kaj la Maldivoj, la insuloj en la Hindu Oceano. Estas beleĝe!

Jan Milld

SEJU

La Internacia Junulara Kongreso en Karlskoga 20–26 de julio 1991 estis tiel unika afero por nia lando, ke ni publikigas ankoraŭ unu raporton pri ĝi, ĉi-foje el perspektivo de ne-sveda partoprenanto.

IJK -91 en juvele rava lando

Dum la monatoj antaŭ la IJK mi havis pro diversaj kialoj kelkajn dubojn pri ties sukceseblecoj, organizaĵaj kaj etosaj. Organize, ĉar la informoj, kiujn oni anticipis diskonigis, estis ne pli ol la plej necesaj. Eĉ la dua informilo estis sufiĉe senenhava, tiel ke ekestiĝis la dubo, ĉu entute io okazos en Svedio. Etose, ĉar Svedio estis post Kubo denove finance ne-tiel-atingebla lando, kaj tio povus fortimigi multajn el la tradicia rondo de IJK-antoj.

Ĉe la alveno la ricevita programo aspektis iom malabunda, kaj fakte mi jam ekpripensis, kian detruan raporton mi poste povos verki. Tamen necesis nur kelkaj horoj por forigi tiujn grandparte malpravajn antaŭjuĝojn. La popolaltlernejo de Karlskoga estis brila: Luksa ĉefkonstruaĵo kun preleĝejoj, manĝejoj, bona dancejo, trinkejo kaj babilejo kaj ĉirkaŭ ĝi en verda ebenaĵo la dormejoj (unuetaĝaj dometoj, el kiuj kelkaj servis ki-

el amasetloĝejoj, same luksaj), la sportejo kun saŭno, kaj la kampadejo, tiu lasta tuj apud neforgesebla lago. La manĝoj estis pintaj (nur la francoj plendetis), kaj mi senlime enamiĝis al la sveda krakpano (=knäckebröd). Cetere, la svedoj uzas ruzan teknikon por liberigi sin de la ĉiutaga terpomsenseligado: ili ne senseligas, ĉiutage. Dankon por la sugesto!

Ankaŭ la nombro da partoprenantoj superis mian atendon: 189 el 35 nacioj (ŝajne oni praktike nun definitive kalkulas laŭ nacioj anstataŭ laŭ landoj). Rimarkindas, ke neniu grupo havis gravan plimulton, krom iom Svedio. El tio rezultigis ĝojige senkrokodila kongreso.

Iom pri la "K" en IJK: Mi jam menciis la ne tre riĉan programon, kaj ĉefe la tema programo malsanis je tio. La jusa IJK certe ne estis kongreso laŭ la strikta difino de la vorto, ĉar ni ne vere multon eksciis pri la kongresa temo (mondaj movadoj). Certe eblus fari pli pri tio. Tamen, mia kriterio por sukcesa IJK estas, ĉu mi jes aŭ ne bone amuziĝis, kaj al tiu demando mi tutkore respondas: JES! Sed mi ja povas kompreni la homojn, kiuj sopiras al iom pli da kongreseco.

La noktoj estis mallongaj, ne nur pro la dancejo, sed ankaŭ pro la suno: je noktomezo ankoraŭ ne tiom malheliĝis, kaj je la kvara jam estis denove tute hele. Dum tiuj svedaj vesperoj koncertis Persone (kun nova kasedo), Amplifiki (kun novaj anoj) kaj Nataša kaj Ĵomart (kun

granda sukceso). Ankaŭ subĉiela lignofajro estis ĝuoplena afero. Tie, tute neplanite, koncertis parto de la iama, vera Amplifiki.

Svedio, la lando: Du aferoj okulfrapis min – la altaj kostoj kaj la amasoj da spaco kaj naturo. Unue, la kostoj. Ni estis avertitaj, kaj per iom da atento eblis elspezi ne pli ol akceptindan kiomon da mono. La LKK faris laŭdindajn klopodojn oferti en la kongreseja trinkejo tre pageblajn varojn, je ĝis kvinono de la kutimaj svedaj prezoj, tiel ke glaso da suko kostis eĉ malpli ol en Belgio. Sed surprizis min, ke ankaŭ la svedoj mem plendas pri la ĝeneralaj vivkostoj. Ŝajne la salajroj, kvankam pli altaj ol en Mezeŭropo, ne estas samproportie pli altaj ol la prezoj. Ne mirige do, ke la septembra baloto estas ofta paroltemo.

Due, la naturo kaj la spaco. Lagoj, ebenaĵoj, arbaroj... kaj ie-tie domo. Nu, 8,5 milionoj da homoj sur surfaco egala al Francio ja ne sentas bezonon formikumi. Krome, la naturo estas purega, kaj ne nur la naturo, ankaŭ domoj kaj stratoj estas tre orde prizorgataj. Svedio, ni revidos unu la alian!

Stefaan Cottenier
(El *Koncize* 5/1991)

Oskarshamn även för ungdomar

SEJU hoppas att även många unga vill komma till SEF-kongressen i Oskarshamn. För att fler ska ha möjlighet till det, så ordnar SEJU med frukost till självkostnadspris för sina medlemmar. Det finns även möjlighet att köpa vissa måltider i matsalen. Detta måste dock anmälas i förväg. Ring senast den 8 maj till Kajsa Larsson, tel: 08/88 62 56.

Kongressavgiften och billigt golv-logi betalar du till kongresskontot (se information på sidan 3).

Kallelse

till SEJU:s årsmöte
den 23 maj 1992 kl 09.30
på Oskarshamns folkhögskola.
Alla medlemmar och andra
intresserade välkomnas.

Ekzamenoj estas io por vi!

Ĉu vi volas havi diplomon pri via scio de Esperanto? Eble vi diras "ne, mi ne bezonas tion". La diplom-papero vi verŝajne ne bezonas, sed eble vi bezonas konkretan celon (*mål*) por via studado de Esperanto. Se vi decidis prepariĝi (*förbereda sig*) por ekzameno, vi havas konkretan celon por viaj studoj.

Ekzistas diversaj specoj de ekzamenoj:

- Ekzamenoj de Sveda Esperanto-Instituto (elementa kaj supera)
- Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI (elementa kaj meza)

La svedaj ekzamenoj okazas printempe en ĉiu jaro. Lokaj Esperanto-kluboj, post interkonsento kun la instituto, povas aranĝi ekzamenojn en sia urbo. Al la svedaj ekzamenoj apartenas tasko traduki el Esperanto en la svedan, kaj inverse. Pri la detaloj, legu apudan informon.

Internaciaj ekzamenoj estas organizitaj dum Universaliaj Kongresoj kaj en kelkaj landaj aranĝoj, ekzemple en la someraj kursoj en la popola altlernejo en Kungälv. Al la elementa internacia ekzameno apartenas tiuj ĉi taskoj: Skriba parto: lega kompreno, diktaĵo (skribado laŭ laŭle-go), eseo kaj aŭskulta kompreno. Parola parto: interparolo pri bildstrio, pri la esperanta kulturo kaj pri kelkaj ĉiutagaj (*vardaglig*) temoj. Vi povas legi pli pri la internaciaj ekzamenoj en *Internaciaj Ekzamenoj de UEA/ILEI, Gvidilo*, kiun vi povas mendi ĉe Esperanto-Centro.

Leif Nordenstorm

Ekzameniĝu!

Skrivningsdag för esperantoexamen blir i år den 17 maj. Både högre och lägre examen kan avläggas. För upplysningar om reglemente, krav, kostnader och sista anmälningdag vänd er till Svenska esperantoinstitutet, c/o Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg.

Testiĝu!

För att du skall kunna bedöma svårighetsgraden i skrivningarna, ger La Espero dig här texten till 1990 års skrivning för lägre examen (år 1991 ägde inga skriftliga prov rum). Facit kommer i nästa nummer av tidningen. Du får använda ordböcker så mycket du vill. Om det visar sig att du klarar de här texterna bra, tveka då inte att anmäla dig till examen! Det är roligt att ha papper på sina kunskaper, och en examen är något som inte ens den officiella grundskolan eller gymnasiet kan erbjuda dig!

Översätt till svenska:

Kiam mi je la 10-a vespere hejmenvenis en mian familian neston, mia edzino atendis min kun tiuj vortoj:

"Mi aŭskultis en la radio prelegon pri edukado de gepatroj."

"Tre bone vi faris", mi kapjesis. "Mi ŝatas, ke vi kulturigās. Sed nun donu al mi iom por manĝi, mi petas, ĉar mi apenaŭ vidas pro malsato."

"Ankaŭ tion lernas de vi la infano", riproĉe diris al mi mia edzino kaj eksidis.

"Kion li lernas de mi?"

"La senpaciencon. La fileto estas tiel nervoza, ĉar vi ne montras memdisciplinon. La infano konduktos, kiel li vidas de siaj gepatroj."

"En ordo", mi diris, "sed nun bonvolu doni al mi vespermanĝon."

"Ĉu vi vidas", riproĉis min mia edzino, "ankaŭ la infanon vi ĉiam interrompas. De vi li lernas tiun malbonan kutimon."

Översätt till esperanto:

Till slut fick jag mat. Jag åt med gaffel, när min fru sa till mig:

"Hur äter du egentligen?"

"Vad menar du?"

"Varför använder du inte kniven också? Och ät inte så glupskt. Pojken kan inte lära sig äta snyggt, om hans pappa uppför sig som en barbar vid bordet."

Jag gjorde mig i ordning för att gå och lägga mig. Jag lade mina kläder på en stol. Min fru ingrep:

"Var har du lagt kläderna?"

"Där jag brukar."

"Titta där!" sa hon och pekade på en annan stol, där min sons kläder låg slängda ovanpå varandra.

Min fru har faktiskt inte tid att uppfostra vår son, för hon uppfostrar mig hela tiden.

Kio estas fortuno?

La antikva ĉina taoisma filozofo Lieh-tzu rakontas:

Maljuna viro loĝis kun sia filo. En iu tago li perdis sian ĉevalon. La najbaroj venis por esprimi sian bedaŭron pro la misfortuno (*otur*), kiu trafis lin, sed la maljunulo demandis: "Kiel vi povas scii ke estis misfortuno?" Post kelkaj tagoj la ĉevalo revenis, kaj kun ĝi venis aro da sovaĝaj ĉevaloj; nun la najbaroj alvenis kaj gratulis lin pro la fortuno (*tur*). La maljunulo respondis: "Kiel vi povas scii ke tio ĉi estas fortuno?"

Ĉar ili ricevis tiom da (*sã mǎnga*) ĉevaloj, la filo komencis rajdi, kaj iun tagon li falis de sur la ĉevalo, kaj rompiĝis al li la kruro. La najbaroj denove alvenis por esprimi sian kompaton (*deltagande*), sed la viro respondis: "Kiel vi povas scii ke tio ĉi estis misfortuno?" En la posta jaro ekestis milito, kaj ĉar la filo estis kripla, li ne devis iri al la fronto.

Tiu ĉi rakonto instruas al ni, ke ĉiu misfortuno donas ian fortunon.

Instruistoj lernas Esperanton

Dekduo da instruistoj en Årjäng dum semajnfino en novembro de vendredo ĝis sabato fariĝis lernantoj. Tio okazis ĉar la kasisto de la esperanto-klubo en Årjäng, Birgitta Edgren, interesigis siajn gekolegojn pri la fako Esperanto. La instruistoj povas kalkuli la tagojn kiel parton de trisemajna deviga plustudado, kiu normale devus okazi somere.

La instruisto, Ingemar Nordin, uzis sian propran lernolibron *Lernu Esperanton nun*, kiu estas pedagogie bona materialo, kaj la libron *Liza kaj Paŭlo* kun kasedo.

Du instruistoj kunportis muzikilojn. Tiel la partoprenantoj povis ĝui ankaŭ esperantaj kantojn.

Dum la mallonga kurso la partoprenantoj lernis multe. Tio donis al ili scion de tute nova lingvo kaj ankaŭ dutagan libertempon por la somero. La ideo estas ripetinda en aliaj lokoj.

Bertil Danielsson

Litteraturseminarium

Södra distriktet av SEF anordnar den 25-26 april 1992 ett litteraturseminarium på Gullbrannagården vid Halmstad.

Medverkande är Jon Rømmesmo och Odd Tangerud från Norge. Båda är välkända genom sina översättningar av bl.a. poesi och dramer till esperanto.

De kommer att presentera allt ifrån Eddan till modern litteratur, såväl barnlitteratur, poesi som prosa. Naturligtvis kommer deltagarna att få aktivt medverka.

Eftersom deltagarantalet i viss mån måste begränsas – brist på övernattningssmöjligheter – gäller det att vara ute i god tid med anmälan.

Senast den 25 mars måste vi ha din anmälan.

Närmare upplysningar lämnas av **Ann-Christine Kron Dahl,** tel: 044/325 164.

Trollhättan-Vänerns borg ree aktivas

Evald Lind en Trollhättan kontaktis klubon en Kungälv kaj per ĝia helpo aranĝis ekspozicion en la urba biblioteko dum unu semajno, kune kun la nova adepto Fredrik Olofsson.

Sur ekranoj oni muntis afiŝojn, gazetojn, reklamilojn por la kursoj en Karlsskoga kaj sur tablo librojn, gazetojn kaj prospektojn pri la perletera kurso de SEF. Dum la semajno oni ĉiutage inter la 16-a kaj 18-a horoj povis trovi tie informanton, kiu ankaŭ notis la adresojn de interesitoj. Kelkaj el ili verŝajne jam mendis la korespondan kurson, kelkaj eble ekhavis eblecon partopreni studrondon, kiun Fredrik promesis gvidi.

La ekspozician materialon pruntis Sune Ahlm por fari similan prezentadon en la urba biblioteko de Vänerns borg. Dank' al la anonco en la loka gazeto, la radiostacio Radio Väst petis pri intervjuo kvaronhora kaj la 29-an de novembro Sune klopodis ene de tiu mallonga tempo klarigi kiom eble plej multe pri la lingvo kaj ĝiaj avantaĝoj. Laŭ raportoj de aŭskultintoj la intervjuo estis interesa kaj do, es-

pereble, vekis intereson ĉe iuj. Nun gimnazia biblioteko interesigis pri aranĝo de simila ekspozicio en januaro. Do, ne ĉiuj semoj falis sur rokon.

Sune W. Ahlm

Kvin diversaj kursoj en Malmö

Klubo Esperantista en Malmö en sia organo *La Folio* anoncas kvin diversajn kursojn por la printempa semestro; por-komencanta kurso; daŭriga kurso; paroliga kaj literatura kurso; ripeta kaj paroliga kurso kaj fine semajnfina kurso por komencantoj. Estas bonega ideo, ke la Malmö-anoj aranĝas kursojn ankaŭ por malnovaj esperantistoj.

Loteria profito

La loterio *Espero 91* donis profiton de 33.837 kronoj al Sveda Esperanto-Federacio. Ni dankas al la aranĝinto Lennart Svensson.

Sune W. Ahlm deŝanta ĉe la ekspozicio en la biblioteko de Vänerns borg



Nova redaktisto

Stefan Maul, kiu fondis kaj dum dek du jaroj redaktis la internacian novaĵrevuon *Monato*, ne plu estos ĝia ĉefredaktisto. Tiun rolon transprenos aro da redaktistoj. *Monato* nun havas 200 konstantajn kunlaborantojn en 40 landoj kaj legantojn en 80 landoj. La laboro de Stefan Maul estis pionira. *Monato* estas la plej prestiĝa ĝeneraltema revuo de la esperanta lingvokomunumo.

Ukrajno filmas kaj instruas

Ukrajnaj filmistoj faris filmon pri Vasilij Eroŝenko, blinda esperantisto, kiu i.a. vizitis Japanion, kie li instruis Esperanton. La filmistoj ankaŭ prezentos filmon pri la ukraina Esperanto-movado.

En Slavjansk en Ukrainio fondiĝis "Tutunia Instituto de Administrado", kiu instruas administradon kaj Esperanton.

Doktora disertacio

Aperis ankoraŭ unu doktora disertacio pri Esperanto. Bonoit Philippe publikigis 378-paĝan disertacion en la filozofia fakultato de la universitato de Konstanz, Germanio. La disertacio esploras kiel Esperanto ĝis nun evoluis.

Kongreso en Vieno

Ĉis la komenco de decembro 500 personoj el pli ol 40 landoj aliĝis al la 77-a Universala kongreso de Esperanto. Ĉi-jare ĝi okazos en Vieno, kie i.a. situas la Internacia Esperanto-Muzeo. La temo de la kongreso estos "Kiam falas muroj de miljaroj; komuna eŭropa domo".

Belartaj konkursoj de UEA en 1992

UEA denove invitas verkemajn esperantistojn partopreni en la Belartaj Konkursoj, kies kadro ĉi-foje estas aparte loga; ja la rezultoj estos anoncitaj en Vieno, unu el la mondaj ĉefurboj de kulturo kaj arto.

La konkurso konsistas el sep tradiciaj branĉoj kaj, eksperimente por la dua fojo, el vidbenda branĉo. La premiaj monsumoj estas plialtigataj.

La konkursaĵoj de ĉiuj branĉoj devas esti novaj kaj (escepte de infanlibroj) ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksitaj. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro ne fiksitaj. Tri premioj.

Eseo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Longo ĉirkaŭ 400 x 65 tajpospacoj. Premio Luigi Minnaja (unu).

Kanto: Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio An-okin (unu).

Fotografio: Temo ligita kun Esperanto aŭ kun tiu de la UK en Vieno. Tri premioj.

Vidbendo: Temo prefere ligita kun Esperanto. Maksimuma daŭro 30 minutoj. Sistema VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro aperinta en 1991. Unu premio.

Alsendo de la konkursaĵoj: La konkursaĵoj por poezio, prozo, teatraĵo kaj kanto estu senditaj en kvar ekzempleroj al: Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Ili devas alveni plej malfrue la 31-an de marto 1992. Por fotografio kaj vidbendo oni sendu po unu ekzempleron al tiu adreso por alveni plej malfrue la 1-an de julio 1992. Por la branĉo de infanlibroj la eldonejoj sendu po tri ekzemplerojn de la libro al la sama adreso por alveni plej malfrue la 31-an de marto 1992.

La konkursaĵoj portu indikon pri la branĉo, por kiu ili estas celitaj, kaj (escepte de vidbendoj kaj infanlibroj) estu signitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto estu enfermita la vera nomo kaj adreso de la konkursanto. Oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de premiita verko apartenas al UEA. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, sed tiu konsentas cedi ĝin senpage okaze de eldono de antologio de la Belartaj Konkursoj, kondiĉe ke tiu aperu kun la aprobo de UEA.

Premioj: Unua premio 360 gld; dua premio 252 gld; tria 144 gld. Premio Luigi Minnaja ĉ. 300 gld. Premio An-okin 360 gld. Premio Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) 252 gld, plus enskribo sur la pokalon Henry Harabagiu. Infanlibro de la jaro 756 gld. Ĉiu premiito ricevos diplomon.

Detala regularo haveblas ĉe la supra adreso kontraŭ unu respondkuponon.

GE ESPERANTO EN REJĀL CHANS ATT SPRIDAS!

Det saknas inte id\u00e9er f\u00f6r hur vi skall kunna arbeta f\u00f6r esperanto. D\u00e4remot saknas det pengar. Vill du ge esperanto en rej\u00e5l chans att spridas? Ge d\u00e5 en friskostig g\u00e5va till Esperantof\u00f6rbundet!

- Du kan betala 1 000 kronor och p\u00e5 s\u00e5 s\u00e4tt ansluta dig till **Klubo Mil** (Esperantof\u00f6rbundet, postgiro 21 12-3).
- Du kan ocks\u00e5 beg\u00e4ra automatisk \u00f6verf\u00f6ring fr\u00e5n ditt bankkonto till Esperantof\u00f6rbundet. P\u00e5 det s\u00e4ttet ger du varje m\u00e5nad en g\u00e5va. H\u00f6r efter med din bank.

L S P R N T O K O M N M O

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apena\u016d rekonebla. Gi perdus multon. E\u010d sian sencon.

Per membri\u011do en UEA a\u016d \u011dia junulara sekcio TEJO, vi ali\u011das al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...

La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldona\u011doj...

La plej kompleta Esperanta libroservo regalos vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.

La kunlaboro...

La revuoj Esperanto, TEJO-tutmonde kaj Kontakto donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen \u010do por efike aktivigi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Ali\u011du al UEA.

Sendu viajn kompletajn nomojn kaj adresojn, profesion kaj naski\u011dtagon kun via kotizo (vd. kotiztabelon sube) al via landa peranto:

S-ino Lisbet Andr\u00e9asson, S\u00f6dra R\u00f6rum pl 455, 242 94 H\u00f6rby, p\u00e5k. 14 74 29-5.

MA	Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon <i>Esperanto</i>)	290 kr
MA-T	Juna Membro-Abonanto (\u011dis 29 jaroj - ricevas anka\u016d <i>Kontakt</i> on)	290 kr
MJ	Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon)	115 kr
MJ-T	Juna Membro kun Jarlibro (\u011dis 29 jaroj - ricevas anka\u016d <i>Kontakt</i> on)	115 kr
MG	Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio)	50 kr
DM	Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo)	7250 kr

\u010cu vi verkas por *La Espero*?

La Espero estas jam de kelkaj jaroj produktata tute komputile. Por la redakto, kompostado kaj grafika aran\u011do ni uzas komputilojn de la marko Macintosh. Kompare kun pli fruaj teknikoj uzitaj tra la historio de nia gazeto, tio signifas grandajn avanta\u011dojn en preska\u016d \u010du rilato. Inter ili menciindas ekz. ebleco facile kaj rapide korrekti erarojn trovitajn dum provlegado, kio anta\u016de estis komplika kaj multekosta afero.

Tamen e\u010d per la moderna tekniko, la tekstoj ne eniras la gazeton per si mem; artikoloj ricevita manuskripte devas esti entajpita en la memoron de la komputilo. Tio signifas sufi\u010de multe da laboro por la redakcio kaj foje, kiam temas pri malfrue ricevita materialo, e\u010d riskas prokrastigi la aperon de la gazeto.

Do, se vi disponas pri komputilo kaj emas uzi \u011din verkante por *La Espero*, ne hezitu sendi viajn kontribuojn sur komputila disketo! Ni povas per niaj nunaj rimedoj akcepti materialon la\u016d la formatoj de \u010duj Macintosh-, IBM-kongruaj kaj Atari ST-komputiloj.

Se vi uzas Macintosh-komputilon, kontaktu la redaktoron de *La Espero*, kiu disponigos al vi litertipon kun la esperantaj \u010apelitaj literoj. Uzantojn de la aliaj markoj ni petas procedi jene:

Verku vian artikolon uzante vian preferatan solvon por la esperantaj literoj. Poste, anta\u016d ol sendi la artikolon al la redaktoro, uzu la funkcion "ser\u010du kaj anstata\u016du" de via tekstprogramo por redoni la esperantaj literoj la\u016d la sekva tabelo:

\u010c	=	cx
\u010c	=	Cx
\u011d	=	gx
\u011d	=	Gx
h	=	hx
\u011a	=	Hx
j	=	jx
\u011a	=	Jx
s	=	sx
\u011a	=	Sx
\u016d	=	wx
\u016d	=	Wx

Nepre ne forgesu kunsendi vian artikolon anka\u016d surpapere, prefere "normalaspekta" koncerne la esperantaj literojn, por la unua trarigardo de la redaktoro. Dankon!

Per Aarne Fritzon

Kalendaro

MARTO

16 marto–22 majo **Daŭriga kurso**, Karlskoga Popola Altlernejo

APRILIO

13–20 **8-a Printempa Semajno Internacia**, por plenkreskuloj kaj infanoj, Bad Neuenahr-Ahrweiler, Germanio (Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D–W–5483 Bad Neuenahr, Germanio)

18–25 **Internacia renkonto de infanoj**, Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F–49150 Baugé, Francio.

25–26 **Lingva seminario**, pri norvegaj literaturo kaj folkloro, Gullbrannagården, Halmstad (Suda distrikto de SEF)

30 aprilo–5 majo **Latvia Internacia Printempo**

MAJO

9–15 **1-a Pekina internacia simpozio pri aplikado de esperanto**, Pekino, Ĉinio (Pekina Esperanto-Asocio, P.O. Box 1089, CN–100034 Beijing, Ĉinio)

22–24 **Sveda Esperanto-kongreso**, Oskarshamn, vidu paĝon 3.

JUNIO

5–8 **70-a Germana Esperanto-Kongreso**, Schwerin, Germanio (Ūrsula Felhölter, Lathener Str. 4, G–W–4500 Osnabrück, Germanio)

24 junio–9 julio **Internacia amika renkonto**, Kultura Esperanto-Domo, adreso supre.

28 junio–3 aŭgusto, **25-a Somera Studsemajno**, Jyväskylä, Finnlando (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF–40630 Jyväskylä, Finnlando)

JULIO

6–11 **Somera kurso**, Karlskoga Popola Altlernejo

18–25 **1-a mondkongreso de Esperantistoj Handikapuloj**, (Asocio de Esperantistoj Handikapuloj, p.k. 63, CS–274 01 Slany, Ĉeĥoslovakio.)

9–22 **Preleĝoj kaj kursoj**, Kultura Esperanto-Domo, adreso supre.

23 julio–5 aŭgusto **Lernu, praktiku kaj perfektigu**, Kultura Esperanto-Domo, adreso supre.

25 julio–1 aŭgusto **Universala Kongreso de Esperanto**, Vieno, Aŭstrio.

AŬGUSTO

2–8 **Turismaj tagoj**, Vrátna valo (Esperanto-klubo, P.O.B. B-152, CS–012 41 Zilina, Ĉeĥoslovakio)

2–9 **48-a Internacia Junulara Kongreso**, Montreal, Kanado (Informoj venos en *La Espero*)

6–19 **Lernu, praktiku kaj perfektigu**, Kultura Esperanto-Domo, adreso supre.

20 aŭgusto–2 septembro **Instruado kaj instru-helpiloj**, Kultura Esperanto-Domo, adreso supre.

24 aŭgusto–16 oktobro **Kurso por komencantoj**, Karlskoga popola altlernejo

SEPTEMBRO

12–19 **Internacia Semajno**, studa kaj turisma, Montpellier, Francio (Centro Culturel Esperanto, 5, Rue du Docteur Roux, F–34000 Montpellier, Francio.)

OKTOBRO

26 oktobro–18 decembro **Daŭriga kurso**, Karlskoga popola altlernejo

DECEMBRO

15 **La tago de la libro**

OFTE:

Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, F–49150 Baugé, Francio. (Ankaŭ gastigo)

Anoncetoj

Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, la plej vasta esperantista faka organizo, intencas pligrandigi sian anaron en ĉiuj landoj. Fervoĵisoj en Svedio, kiuj deziras membriĝi, kontaktigu kun la sekretario: d-ro Romano Bolognesi, Via Misa 4, I–40139 Bologna, Italio.

Ben Zinkpé en Benino deziras iam partopreni Universalan Kongreson. Se vi volas subteni lian vojaĝon, sendu monon al sveda poŝtĝiro 7 43 74–0 (UEA). Sur la pagilo skribu alaf-f, por vojaĝo de Ben Zinkpé.

La kantgrupo el Karlskoga "Trifolio" eldonis kantokasedon. Prezo: 60 kronoj + sendokostoj: Lotta Johansson, Skolgatan 21 A, 693 30 Degerfors, 0586-412 11.

DEZIRAS KORESPONDI

Tri dekdujaraj knabinoj kaj tri dekdujaraj knaboj: Grupo Trifolio, P.O. Box-10, LT-4430 Jurbarkas, Litovio.

Tridek 14–16-jaraj lernantinoj deziras korespondi kaj trovi amikojn en najbaraj landoj: Domo de infana kaj junulara kreado, Esperanto, prosp. Lenina 63-a, 183705 Murmansk, Rusio.

63-jara pensiulo pri diversaj temoj deziras korespondi kun ĉiuaĝuloj: Alfréds Gegermanis, Ciemupe, str. Mednieku 2, 228320 Kegums, Latvio.

18-jara studento pri literaturo, lingvoj, sporto, komputiloj, turismo, vojaĝado: Aleksandro Ĥromov, st. Kaluĵskaja 14-6, 236100 Kaliningrad, Rusio.


16-jara fraŭlo pri muziko, sporto kaj kino: Mindaugas Teišerskis, Kauno 30^B-2, 234430 Jurbarkas, Litovio.

17-jara latvino pri biciklado, vojaĝoj, filozofio, psikologio, naturaj fenomenoj: Inguna Abuce, Macitajmuiza, vil. Jaunpiebalga, LT-228544 reg Cesis Latvio.

19-jara studentino pri muziko, naturo kaj bestoj: Desislava Visileva, ul Rodina bl. 131, bh B, et 3, kv Ĥadĵi Dimit'r, BL-1510 gr. Sofia, Bulgario.

25-jara latvo kun diversaĝaj esperantistoj: Romas Vosylius, str Ŝvietimo 20, LT-4520 Marijampole, Latvio.

Krucvortenigmo



Horizontale:

- 1 Librejo
 2 Arkten
 3 Ribuj' – Centono de krono
 4 Pruntita – Subtera fe'
 5 Insulo kaj lando
 6 Kursperiod' – Vok' por venigi

- 7 Ligna kuv' – Nedifina pronomo – Individuo
 8 Aŭtunmonatan
 9 Porcelanmineral' – Antaŭ trie
 10 Pozitiva respondo – Kutima konduto

Vertikale:

- A Naskiĝurbo de Z.
 B Kruda, ne glata
 C Ili parolas pri negravaĵoj
 Ĉ Samnivela ĉambrar' – Grasa likvaĵ'
 D Meritantan – Sankta bird' en antikva Egiptujo
 E Du nuloj – Tagnokt'
 F Manĝujon por brutoj
 G Paradiz' – Eble rezulto de mistranĉo
 Ĝ Emblemo de ludkarto – Instrument' – Formortinta bov'
 H Kiun nomon havas vorto, kiu imitas naturan sonon?

Kompilis: **Lennart Persson**

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	M	A	T	E	N	O	■	R	A	S
2	A	T	E	N	O	■	F	A	L	K
3	R	E	N	■	T	O	A	S	T	O
4	G	N	O	M	O	■	S	T	A	L
5	A	T	■	A	S	E	K	U	R	O
6	R	E	I	R	■	N	A	S	O	■
7	I	■	S	T	E	L	■	■	J	A
8	N	O	M	I	N	A	L	A	■	K
9	O	D	O	R	A	S	■	V	A	R
10	J	O	N	O	■	I	D	O	L	A

Solve de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 5-6/1991

Donacoj

Claes Göran Ingestedt, Vällingby 100.
 Leif Nordenstorm, Luleå 75. Göta Nordlander, Kramfors 25. Harry Victorin, Arboga 100. Nynäshamns Esperanto-Sällskap 1365.

Je memoro de Martin Säter:

Sigurd Olsson, Strömnäsbruk 200.

Klubo Cent: Ljungby Esperantoklubb 100. Gustav Nygård, Göteborg 100. Owe Kleborgh, Hässleholm 100. Anna-Greta och Jan Strönne, Malmö 200.

Ni dankas ĉiujn donacintojn!

Mer ORDBYGGGE

Nu finns "Mer ORDBYGGGE" klar i en reviderad upplaga (från den 27/12 1991). Den andra i serien av Ordbygge-skrifter från Jan Milld.

Den nya versionen av "Mer Ordbygge" är på 36 sidor och koncentrerar sig helt på verb – vilka som är transitiva och vilka som är intransitiva.

En skrift som kan fylla ett behov inom svensk esperanto-rörelse. Den rymmer dels en ordlista, dels försök att bena ut en del om olika slags verb.

Priset är bara **20 kr**, inklusive porto, så det är inte mycket pengar du riskerar genom en beställning.

Du beställer genom att

sätta in beloppet på postgiro 80 73 30 – 6, med angivande av egen adress och vad som beställs.

Sten Svenonius
Erikstorpsg 26 A
21754 Malmö

Esperantoförbundet, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Recenzoj

Du novaĵoj el Rusio

Anton Ĉeĥov: **Sveda alumeto. Novela-ro.** Rusa literaturo. Trad: diversaj. Sezonoj. Sverdlovsk 1991. 139 p.

Post la florado de esperanta kulturo en Sovet-Unio dum la dudekaj jaroj, preskaŭ neniu rusa literaturo aperis libroforme en Esperanto. Tial tiu ĉi novelaro de Ĉeĥov estas signifa, ĉar ĝi estas unu el multaj signoj de nova florado de rusa esperanto-movado, en kiu la esperantistoj en Jekaterinburg (eks-Sverdlovsk) ludas gravan rolon.

Anton Ĉeĥov (1860-1904), profesie kuracisto, famiĝis pro siaj kelkcent noveloj, en kiuj li iam simple amuzas, sed ofte kun psikologia atentemo priskribas diversajn kompatindajn homajn sortojn, en kiuj la legantoj certe iam rekonas sin mem. Guste tial Ĉeĥov estas amata.

Novelaro de Ĉeĥov estas bona elekto de traduko en esperanton. Novelojn po-

vas legi kaj mezbona esperantisto, kiu ne kuraĝas gluti dikan romanegon, kaj la sperta esperantisto-literaturamanto.

La tradukoj estas bonaj. Tamen ekzistas kelkaj makuloj. *mie* (p. 39) devas esti "laŭ mi"; *aliel* (p. 40) estu "alimaniere" ktp.

Aĉetu, legu kaj ĝuu...

Leif Nordenstorm

Jurij Ŝĉerbak: **Ĉernobil.** Eldonejo Progreso, Moskvo, 1990, 400 p.

Unu de la plej teruraj akcidentoj konataj, estas tiu de la atomcentralo en Ĉernobil en 1986. Minacas nin novaj similaj akcidentoj pro la ekzistantaj atomcentraloj, al kiuj mankas la necesa sekureco.

En tiu libro, nomita dokumenta novelo, ni renkontas tre diversan galerion da homoj kun spertoj pri la akcidento. Per-



sonaj rakontoj de teknikistoj de la atomcentralo, de funkciuloj de la urba kaj regiona administracioj, de kuracistoj, militistoj kaj ordinaraj homoj, kiel tiu de maljunulino, kiu rifuzas forlasi la kondamnitan zonon, sed vivas daŭre, sola en vilaĝo forlasita de sia enloĝantaro.

La libro estas sufiĉe ampleksa, 400 paĝojn, sed la formato permesas, ke ĝi facile trovas lokon en poŝto aŭ mansako; proksime, por ebligi legadon dum ĉiu libera tempo. Ĉar, spite al la kelkfoje peza kaj tre teknika teksto, ĝi kaptas la leganton. Aro da bildoj alproksimigas la tragedion.

Mi citas el la libro d-ron R Gail, profesoro de Kalifornia universitato: "Ĉernobil iĝis por ni ĉiuj memorigo pri tio, ke la mondo devas por ĉiam ĉesigi ajnan eblecon de eksplodo de la nuklea milito."

Kiu supren kraĉon ĵetas, sian barbon al ĝi submetas.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSTITA PER LA LITERTIPO CASLON]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Pli ol du mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 Tyresö · Tel. 08-742 83 36 · Fakso 08-712 39 93

Anita Dagmarsotter